

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №3



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №3 (293)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 89-90.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №3 (293).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 4 марта 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Intervjuo	5
Probal Dasgupta: Kalocsay kaj Waringhien ne hontus pri siaj posteuloj (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski)	6
Lingvo	10
Věra Barandovská-Frank. Komencoj de la lingvokonstruado en Eŭropo: Hildegard de Bingen kaj Athanasius Kircher	11
Jens Stengaard Larsen. La lingvoplanoj de Frederik Dreier	22
Haitao Liu. Kiel kvante lokiĝas Esperanto en homaj lingvoj	28
Sergio Pokrovskij. Aspektoj	37
Carlo Minnaja. La Akademio antaŭ la karaktero de la radikoj	50
Jean-Luc Tortel. Ludovika pretervido	58
La februara <i>Ondo</i> senpage elŝutebla	60
Sabine Fiedler. Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Germanio	61
Halina Gorecka. Planlingvistikaj konferencoj en Uralo	70
Paweł Fischer-Kotowski. Entombiga numero de <i>Esperantologio</i> (Recenzo: <i>Esperantologio / Esperanto Studies</i> , №8)	74
Ilija Gнусarev. Studado en amika rondo	76
Arkivo	79
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en marto 2019	80
Eventoj	81
Spomenka Štimec. Esperanto – nemateria kultura heredaĵo en Kroatio	82
Gediminas Degėsys. Vilno: Esperanto en librofoiro	82
Przemysław Wierzbowski. Jakobo Ŝapiro – unu el dek bjalistokanoj de la jarcento	83
Mesaĝo de UEA al UN kaj Unesko okaze de Internacia Tago de la Gepatra Lingvo	84
Joanne Johns. Aŭstralio: Somera kongreso en januaro	85
Povilas Jegorovas. Survoje al la plej amasa BET en la 21a jarcento	86

Profesorino Gong Xiaofeng prelegos en BET-5587
BET-55: Du prelegocikloj de profesoro Ŝelazny87
Lingvokulturologiaj prelegoj de Aleksandr Melnikov88
Nekrologo88

Kiel aboni <i>La Ondo</i>89
Reklamoj91

Ĉi tiu eldono de *La Ondo de Esperanto* estas speciala. Ĝi estas dediĉita al interlingvistiko kaj esperantologio – sciencaj fakoj, esplorantaj, interalie, la lingvon Esperanto, kiu unuigas nin – la eldonantojn, la aŭtorojn kaj la legantojn de ĉi tiu gazeto. En ĉi tiu *Ondo* vi trovos intervjuon kun la prezidanto de Akademio de Esperanto, Probal Dasgupta, kaj du artikolojn pri interlingvistikaj projektoj kaj ideoj el la tempo, kiam Esperanto ankoraŭ ne ekzistis.

Sekvas kvar esperantologiaj artikoloj, kiuj traktas temojn, ligitajn kun kelkaj aspektoj (ankaŭ pri la *aspektoj!*) de la Zamenhofa lingvo, tri artikoloj pri interlingvistika kaj esperantologia agado kaj recenzo pri la lasta (ve, la plej lasta) numero de *Esperantologio*.

Pro la abunda ĉeftema materialo, ĉi tiu numero estas rekorde ampleksa – 95-paĝa; ĝi certe superus cent paĝojn, se ni enmetus ĉiujn kutimajn rubrikojn, sed ilin vi retrovos en aprilo.

Ni esperas, ke vi ŝatos ĉi tiun eksperimentan numeron.

La kovropaĝo, konforme al la enhavo, montras la centran parton de la komuna foto de la membroj de Lingva Komitato el la fora jaro 1907a.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>


Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Intervjuo



En nia interlingvistika/esperantologia eldono ne povus manki intervjuo kun la prezidanto de la Akademio de Esperanto, la plej grava lingva instanco en Esperanto. Probal Dasgupta volonte respondis la demandojn de Paweł Fischer-Kotowski.

Kalocsay aŭ Waringhien ne hontus pri siaj posteuloj

Intervjuo kun Probal Dasgupta

Prof. d-ro Probal Dasgupta estas barata esperantisto kaj lingvisto, universitata instruisto. Li eniris la Akademion de Esperanto en 1983, en 2001 iĝis ĝia vicprezidanto kaj ekde 2016 prezidas la Akademion. Direktoro de la akademia sekcio pri prononco. Aŭtoro de pluraj artikoloj pri lingvistiko, filozofio, beletristiko kaj socipolitikaj demandoj. Tradukanto, liaj ĉefaj esperantigoj inkluzivas la poemaron *Primico* de Robindronath Tagor (1977), aŭtobiografion *Mi juna* de Manaŝi Das Gupta (1989), kaj romanojn *Klera edzino* de Upendronath Gangopaddhae (1995) kaj *Dormanta hejmaro* de Manaŝi Das Gupta (2006). Redaktoro de *Beletra Almanako*. En la jaroj 2007-13 prezidanto de UEA. Honora membro de la Lingvistika Societo de Usono (2004). (Pli detale pri Probal Dasgupta legu en *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 69-70.)

Pri kiuj lingvaj problemoj laboras nun la Akademio de Esperanto?

En la nuna momento la Akademio sin trovas meze de paŭzo, kutima pro niaj ritmoj. Ĝus okazis balotado: renoviĝis unu triono de la membraro; tion ni faras ĉiun trian jaron. Poste ni elektos novajn funkciulojn – eventuale iom redesegnante la sekciestran fotogalerion. Man-en-mane kun tiuj vizaĝoj aperos agadplanoj por la sekcioj kaj por la tuta institucio.

La retejo de la Akademio estas malvigla. La lastaj “Oficialaj Informoj” aperis antaŭ iom pli ol du jaroj. Ĉu la publiko interpretu tion kiel signon de problemoj en AdE aŭ temas nur pri problemoj pri ekstera prezentado?

Imagu la lingvon kvazaŭ korpon. La sama sango fluas tra ĉiuj vejnoj. Devante dum jardekoj soldate marŝi, Esperanto sendadis multege da sango pieden, interalie delegante ĉiujn prilingvajn okupiĝojn unike al la Akademio. Nun, la lingvo ne nur gustumas la feliĉon povi relative komforte sidi, sed krome dotis sin per multaj kapoj kaj brakoj, kiel iuj dioj hinduaj. Prilingvaj demandoj aŭdiĝadas ne nur en tiuj “brakoj” instituciaj, sed ankaŭ koridore, strande, kafeje. Memoru la leĝon de

Toño: iun ajn konversacion en Esperanto fatale embuskos kaptiĝoj leksikaj aŭ gramatikaj.

Svarmas demandoj, sed malabundas koheraj respondoj. La plorinde malmultaj pintaj respondistoj prioritigas terenojn ligitajn al la ekzamena sistemo, al movadoj en relative senspertaj landoj, al pluraj aliaj defioj kiuj subite kreskigis al la Esperanta korpo tiom da novaj kapoj kaj brakoj. Ofte membras en la Akademio tiuj respondistoj! La prioritatoj tiras ilin nur ŝajne "aliloken".

Lastatempe ni eble nesufiĉe priviglis la akademian retejon. Tamen ne unike tie situas niaj laboroj. Nia Katalin Kováts, ekzemple, klerigadas pri tipe niaj temoj en edukado.net, ja ne eksterakademie. Ŝi modele praktikas la arton labori *dise*. Ŝi fosas la lingvajn sulkojn en agroj novaj, sed ne pro tio malniaj. Ĉu viajn manojn neglektas viaj piedoj? Nur stultaj piedoj ne scipovus modeste foni kiam la mano portas al iu florojn.

Ade

La lasta Oficiala Aldono al la Universala Vortaro, kun 209 radikoj, aperis antaŭ 12 jaroj. Ĉu la Akademio laboras pri la 10a Oficiala Aldono? Ĉu ĝi fakte estas bezonata? Kiom ofte devus aperi novaj Aldonoj kaj kiom ampleksaj ili estu?

La publiko ofte forgesas ke la jamaj Oficialaj Aldonoj estas tre diversaj inter si. Ideale, ili devus liveri kun la aldonataj radikoj difinojn en Esperanto kaj glosojn en la kvin Fundamentaj lingvoj; sed malmultaj el ili plenumas tiujn moderajn postulojn. La publiko prave konsultas normajn vortarojn, precipe PIV, pro siaj kleriĝaj bezonoj. Same kiel mi diris pli frue pri edukado.net, akademianoj kontribuegas ankaŭ al la ĝisdatigado de la normaj referenciloj; tiuj ja ne situas ekster nia laborosfero. En 1974, la Akademio rekonceptis la rolon de la Oficialaj Aldonoj kiam ĝi aperigis la *Bazan Radikaron Oficialan*. Poste ni ne trafis formuli eksplicitan rilaton inter la nocioj "fundamenta" kaj "baza". Ĉu debati pri tiu temo nun? Ni prefere atentu pli urĝajn fajroestingajn taskojn. 10a OA ja ne estas tia tagordero.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Lingvo



Jam dum pli ol 20 jaroj ĉe la Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), estas realigata trijara ekstera postdiploma studado de interlingvistiko sub la gvido de profesorino Ilona Koutny. La nuna grupo, ekstudinta en septembro 2017, ĉi-februare havis sian kvaran sesion. Sur la supra foto de Zhang Ping “Ĝoja” estas la nunaj grupanoj kun instruistoj kaj lokaj esperantistoj.

Komencoj de la lingvokonstruado en Eŭropo: Hildegard de Bingen kaj Athanasius Kircher



Věra Barandovská-Frank (1952-), ĉeĥino, studis klasikan filologion kaj romanistikon, instruis en universitatoj en Ĉeĥio, Slovakio, Rumanio kaj Germanio, laboris en Instituto por Kibernetiko en Paderborn kiel eldonistino kaj redaktorino, verkis centon da publikaĵoj. Ŝi habilitiĝis kaj profesoriĝis pri interlingvistiko ĉe la AIS San Marino. Ŝi instruas en la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM en Poznano. La prezentata artikolo estas parto de ŝia lernolibro, kiun ŝi verkis dum sia 20-jara agado kaj envicigis en ĝin ankaŭ la plej interesajn laboraĵojn de siaj studentoj (ĉi-kaze de la brazila latinisto Fernando Pita).

1. Hildegard de Bingen

Kvankam oni scias, ke la ideo de la komuna interlingvo estas tre malnova, ekzistas nur malmultaj kaj nedokumentitaj indikoj pri la lingvokonstruado en Eŭropo antaŭ la 12a jarcento. La historio de lingvokonstruado vere komenciĝas per la “nekonata lingvo” de teologino Hildegard de Bingen (1098-1178), kromnomata “reja Sibilo”, kiun nunaj ŝatantoj de lingvokonstruado eĉ alnomas “patronino de kriptologoj kaj interlingvistoj”. Hildegard apartenis al la eklezia elito de la 12a jc., estis magistrino, mistikulino kaj teologino, multflanka en artoj (poezio, dramoj, muzikaj komponaĵoj, psalmoj k.s.), rekonata en medicino kaj naturkuracado, precipe aprezata pro siaj filozofiaj kaj teologiaj verkoj kun integra koncepto de universo. Ŝi pritraktis naturon kun ĝis tiam nekutima scienca objektiveco, ŝiaj biografioj atestis al ŝi ankaŭ miraklojn. Ŝi estis proklamita sanktulino kaj doktorino de katolika eklezio.

Hildegard devenis de malgrand-nobela familio de Bermershein (verŝajna familia nomo estis von Stein). Jam kiel infano ŝi havis viziojn. Okjara ŝi eniris monaĥinejon ĉe Disibodenberg sub protekto de magistrino Jutta von Sponheim, kiu instruis ŝin. Dum junaĝo evoluis ŝia klarvideco. En 1114 ŝi eniris la ordenon de benediktaninoj kaj post la morto de Jutta en 1136 estis elektita magistrino. Kiam ŝi havis 42 jarojn, ŝi havis vizon pri profunda senco de sanktaj libroj kaj tiam iu mistera voĉo ordonis al ŝi priskribi tion. Ŝi komencis verki sian “Liber scivias Domini” (Libro de scio pri la vojoj de Sinjoro, aŭ: scivias = sciu vojojn) kun la helpo de monako Volmar,

kiu notis ŝiajn eldirojn kaj perfektigis ŝian latinon. Helpo de aŭtoritata teologo Bernardo de Clairvaux, ŝia verko atingis la papon Eŭgenon la Trian, kiu, post kontrolo fare de speciala komisiono, aprobis ŝian agadon. En 1148 ŝi fondis monaĥinejon en Rupertsberg apud Bingen, kie ŝi plene dediĉis sin al verkado. En siaj vizioj ŝi malkovradis misterojn de religio, kosmo kaj homo. Ŝiaj teologiaj ĉefverkoj estas, krom “Scivias”, “Liber vitae meritorum” (Libro pri meritoj de la vivo) kaj “Liber divinorum operum” (Libro pri verkoj de Dio). Pro kontaktoj de sia familio kun nobelaro kaj altaj ekleziuloj ŝi iĝis konata en tuta Eŭropo kaj korespondadis kun famaj personecoj, sciencistoj, eĉ kun episkopoj kaj reĝoj. Ŝi mem antaŭvidis sian morton. Konservigis pli ol 300 ŝiaj leteroj, tekstoj de profetaĵoj kaj antaŭparoloj al ŝiaj verkoj, el kiuj ni ekscias pri kialoj de ilia kreo.



Inter ŝiaj verkoj troviĝas du “interlingvistikaj” interesaĵoj: vortaro de Ignota Lingua (nekonata lingvo) kaj aparta alfabeto. Ne temis pri grandaj aŭ kompletaj verkoj, tial ili nek estis presitaj, nek transprenitaj de Patrologia Latina, kolekto de gravaj ekleziaj tekstoj fare de Jacques Paul Migne, inter 1844-1855. La unuan publikigon kun titolo *Lingua Ignota per simplicem hominem Hildegardem prolata* faris Friedrich Roth en 1880. Esperantisto Willem Manders malkovris ĝin en 1958 kaj verkis prie artikolon por la bulteno de ISAE. En 1986 “Basler Hildegard Gesellschaft” republikigis kaj reviziis la eldonon de Roth, kaj, fine, en 2007 kaj 2008 aperis eĉ du komentitaj eldonoj kun tradukoj: en la francan lingvon fare de Arnaud de la Croix, filozofo kaj historiisto kun speciala intereso pri mezepoka literaturo, kaj en la anglan lingvon de Sarah Higley, konata interlingvistino kaj mem aŭtorino de fikcia lingvo, kiu projekcias la inventaĵon de Hildegard al lingvoprojektoj tra la historio de lingvoinventado ĝis conlangs. La “nekonata lingvo” kaj la alfabeto estas menciataj en la biografioj de Hildegard fare de monakoj Gottfried kaj Theoderich kaj en “Acta Inquisitionis”, aktoj kolektitaj por ŝia sanktigo. Ŝi mem skribis en la antaŭparolo al “Liber vitae meritorum”, ke dum ŝiaj vizioj montriĝis al ŝi aĉeraĵo klariganta diversajn naturajn okazaĵojn kaj transdonanta nekonatajn lingvon kaj skribon. Ankaŭ el ŝia letero el la jaro 1153 al la papo ni ekscias, ke inter aliaj donaĵoj, Dio transdonis al ŝi la nekonatan lingvon.


La verkoj konserviĝis en kelkaj kodeksoj; la plej impona estas la t. n. “giganta kodekso”, Rupertsberger Riesenkodeks, nun en la Universitata kaj Landa Biblioteko Rejno-Majno (Hochschul- und Landesbibliothek RheinMain) en Wiesbaden. Ĝi pezas 15 kilogramojn kaj konsistas el 481 folioj de pergameno (46 oble 30 cm). Diversaj skribistoj skribis ĝin fine de la 12a jc., ankoraŭ dum la vivo de Hildegard, sub gvido de monakoj Volmar kaj Wibert. Ĝi enhavas ŝiajn verkojn kun escepto

de medicinaj kaj natursciencaj. "Ignota lingua" estas sur folioj 461-464 kaj la alfabeto sur 464 v (verso, t. e. dorsflanko). La kodekso ne estas publike alirebla, sed videbla en interreto. La dua estas "Codex Cheltenhamensis", nun en Berlino (Staatsbibliothek Preussischer Kulturbesitz). Ĝi ekestis kiel kopio ĉirkaŭ la jaro 1300, entenas biografion de Hildegard kaj diversajn aliajn verkojn inklude de la vortlisto kaj alfabeto (Lat. Quart. 4° 674, folioj 58 r [recto, t. e. frontflanko] ĝis 62 r.), la glosaro enhavas unu vorton pli ol la unua kodekso. La tria kodekso, "Codex Hildegardensis", kies kopio estis konata al esperantistoj de la biblioteko de Hofburg en Vieno, perdiĝis. Restas la stuttgarta kodekso, nun en würtemberga biblioteko en Stuttgart, skribita inter 1154 kaj 1178 en Rupertsberg. Ĝi entenas sur folio 28 antifonon "O orzchis Ecclesia" kun kvin vortoj en la Ignota Lingua, el kiuj unu estas en la glosaro, do la tuta vortprovizo devis esti pli granda ol la glosaro. Krome, sur folio 75 v, troviĝas epigrafo "Hildegard xuiuild" skribita en la "Alfabeto Ignota".


"Ignota Lingua" – tiel Hildegard mem nomis ĝin (en inversigita vort-ordo) – ne estas kompakta verko, sed nur nekompleta glosaro, t. e. listo de 1011 vortoj (ĉefe substantivoj kaj kelkaj adjektivoj) kun latinaj tradukoj kaj aldone 300 germanaj tradukoj. Kune kun la vortoj el la berlina kaj stuttgarta kodeksoj temas pri 1016 vortoj,




Antifono "O orzchis Ecclesia"



Riesenkodex, folio 462 v.



Epigrafo en Stuttgarta kodekso



Alfabeto: Riesenkodex, folio 464 v.

sed enestas eraroj: du el la vortoj (hochiz = blinda kaj zingniz = plugilo) estas enmetitaj dufoje, aliaj dek estas homofonoj kun diversaj signifoj. La vortoj estas du- kaj trisilabaj, escepte pli longaj. Ili konsistas el radikoj kun sufikso (malofte prefikso), kiuj modifas la signifon, kaj plej ofte finiĝas je *-s*, *-z* kaj *-l*. La radikoj estas tute aprioraj, ne similaj al ajna lingvo, kiun Hildegard povis koni. Unu vorto, “loifol” (popolo) estas en la antifono deklinaciita “loifolum”, la latina finaĵo *-um* korespondus al la genitivo de pluralo same kiel la antaŭiranta latina vorto “stigmatum”, kaj du vortoj (crizanta, chorzta) havas eble finaĵon de participaj adjektivoj latina *-nta* kaj *-ta*, kiuj akordus kun la rilataj feminaj substantivoj “ecclesia” kaj “gemma”. Krome ne enestas ajnaj finaĵoj aŭ afiksoj similaj al aliaj lingvoj.

La vortoj aperas en grupoj, hierarkie organizitaj de la plej grava al malplej grava, laŭ diversaj temoj: spiritaj estaĵoj, homa mondo, parencaj rilatoj, homa korpo, malsanoj, oficoj, liturgio, profesioj, ĉasado, tempounuoj, monatoj, horoj, monaĥejo, vestaĵoj, instrumentoj, kuirejo, nutraĵoj, arboj, plantoj, birdoj, insektoj. Ne enestas nomoj de bestoj, fiŝoj, steloj, ktp. Ŝajnas, ke povus temi pri traduko de latina vortaro, kiu ne estas finfarita – tiun konjekton oni faras surbaze de vortoj 735-774 (numerado de eldonistoj), kies latinaj ekvivalentoj staras en alfabeto ordo. Ne enestas verboj kaj aliaj vortspecoj, nek gramatiko, kio gvidas al pluaj konjektoj, ke Hildegard uzis verbojn kaj gramatikon de la latina. Neklara estas prononco, kiu eble ankaŭ similis al la latina. La vortoj estas skribitaj kun ellaso de unu linio por glosoj – tiuj estas enigita en pli malgranda skribo. La literoj (skribitaj en latina minusklo) ne estas sufiĉe klaraj, ne bone distingiĝas *s* kaj *f*, similas *m*, *n*, *u*, konfuziĝas *r* kaj *i*. La tradukistoj en la francan kaj anglan do devis apogiĝi ĉefe je latinaj kaj germanaj glosoj. Jen kelkaj ekzemploj:

Aigonz: deus (dio)	Korzinthio: propheta (profeto)
Aieganz: angelus (anĝelo)	Falschin: vates (profeto-poeto)
Zuuenz: sanctus (sanktulo)	Sonziz: apostolus (apostolo)
Liuzionz: salvator (savanto)	Linschiol: martir (martiro)
Diueliz: diabolus (diablo)	Zanziuer: confessor (konfesanto)
Ispariz: spiritus (spirito)	Vrizoil: virgo (virgulino)
Inimois: homo (homo)	Jugiza: vidua (vidvino)
Jur: vir (viro)	Pangizo: penitens (pentanto)
Vanix: femina (virino)	Kulzphazur: attavus (praavo)
Peuearrez: patriarcha (patriarko)	Phazur: avus (avo)

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kosta nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La lingvoplanoj de Frederik Dreier



Jens Stengaard Larsen (1959-) studis la bibliotekistan fakon kaj lingvistikon en Kopenhago. Interesiĝas precipe pri la historioj de la lingvistiko kaj de la Esperanto-movado kaj nuntempe laboras por kolekti siajn trovojn en verko titolota *Lingvo, skribo kaj socio en nova perspektivo*. Redaktoro de *Esperanto en Danio* kaj ĉefredaktoro de *Dansk-esperanto ordbog* (Dana-Esperanta vortaro, DEA, 2010).

Frederik Dreier (1827-1853) estas konata kiel la unua Dana socialisto. Li naskiĝis kaj vivis sian mallongan vivon en Kopenhago dum la t. n. “Ora Epoko” de la Dana literatura historio (kun nomoj kiel Adam Oehlenschläger kaj H. C. Andersen). Liatempe la unuaj fervojoj de la reĝlando estis konstruitaj, sed la remparojn de Kopenhago oni ankoraŭ ne komencis malkonstrui. Li estis medicina studento kaj partoprenis kiel subkuracisto en la unua Ŝlesviga milito 1848-1850, kiu okazis pro insurekcio en la duklandoj Ŝlesvigo kaj Holstinio. Dreier antaŭvidis, sed ne ĝisvivis la duan Ŝlesvigan militon de 1864, pro kiu Danio perdis al Prusio la duklandojn.

Dreier rigardis la militon absoluta frenezajo, sed ĝi estis neevitebla sekvo de la enkonduko de Dana konstitucio, kaj Dreier estis demokrato. Tamen li deziris multe pli vastan popolan partoprenon en la politiko, kaj en 1848 li publikigis du broŝurojn pri siaj vidpunktoj: “Estonteco de la popoloj, de liberpensulo” kaj “La estonta popoleduko, de socialisto”. Formale la konstitucio ekvalidis nur la jaron poste, do kredeble li tial ne indikis sian veran nomon. La broŝuroj vendiĝis tre malbone.

La saman jaron 1848 Karl Marx eldonis la faman “Manifeston de la Komunista Partio”. Ankaŭ tiu havis malmulte da furoro, ĉar Marx ankoraŭ ne estis tre konata. Dreier-on multe pli influis la Franca tipografo Pierre-Joseph Proudhon (1809-1865), kiu en 1840 unua en la mondo nomis sin anarkisto. Nuntempe oni rigardus la vidpunktojn de Dreier plejparte anarkismaj, sed liatempe la limoj inter socialismo, komunismo kaj anarkismo ankoraŭ ne estis klare difinitaj.

Dreier adoris la ideon de progreso, eĉ tute laŭvorte. Al la plimulto de ordinaraj homoj tiutempe la religio ankoraŭ estis la plej grava orientilo en la ekzistado, dum la kultura elito jam komencis pli fervore identigi sin kun la nacio. Sed Dreier havis

ardan kredon ke la Eŭropa civilizo povos disvastigi la ideojn de libereco, egaleco kaj frateco al la tuta tero kaj neniigi ĉiujn landlimojn.

Laŭ tiu vidpunkto klare la estonteco apartenis al la laborista klaso, kaj la kondiĉo de progreso estis starigi laboristan movadon. En Kopenhago jam estis kleriga asocio por laboristoj, kaj Dreier laboris por promocii ĝin al efektiva sindikato. Li eldonis semajnan revuon “La Socia Reformo” kiu estu la ĝermo de laboristaj gazetaraj kaj partio, kaj li helpis fondi la unuan Danan konsum-kooperativon.


Ĉio tio estis tute vana unuafrape. Dum la kvin jaroj de lia agado neniu sindikato aŭ partio realiĝis, la revuo mortis kun li mem, kaj la kooperativo postvivis lin nur mallonge. Sed la memoro kaj la rakontoj pri Dreier fariĝis grava inspiro por la “Moderna Leviĝo” de la 1870aj jaroj, kiam en Skandinavio formiĝis socialdemokratiaj partioj kaj ekkreskis realisma beletra kaj literatura kritiko, kiuj famiĝis tutEŭrope (Henrik Ibsen, Georg Brandes).

Utopio kaj scienco

Samkiel ĉe la Germanaj socialdemokratoj, la ideologian superregon en la Dana partio posedis la “sciencaj” socialistoj (t.e. la Marksistoj). Samkiel la antaŭaj “utopiaj” socialistoj (ekzemple, Proudhon kaj sekve Dreier) ili antaŭvidis la ekeston de monda socio sen landlimoj. Sed laŭ la Marksistoj estis tempoperdo cerbumi pri tiu kiuj lingvoj postvivos la dissolviĝon de la nacioj en pli-malpli malproksima estonteco. La socialdemokratoj anstataŭe koncentris la klopodojn al organizado de la laborista klaso “ĉi tie nun”. Intertempe la ne tiel aktualaj taskoj devis enordiĝi aŭ tute zorgi pri si mem – taskoj inter kiuj evidente inkluziviĝis la politikoj de lingvo kaj de nacieco.

Dum la antaŭ-Marksisma periodo, kontraste, multaj socialistoj kredis ke la vojo al perfekta socio estas konstruebla per la enkonduko de perfekta lingvo. Tio validas precipe pri la Germana tajloro Wilhelm Weitling (1805-1871); ankaŭ Proudhon junaĝe eldonis libron pri lingvo. En Nederlando la utopia socialismo havis pli longan vivon, kaj la frakcio sub Ferdinand Domela Nieuwenhuis (1846-1919) ankoraŭ en 1895 montris viglan intereson pri Volapuko. Koncerne Frederik Dreier, kredeble ne estas troigo diri ke lia tuta filozofio estis lingve bazita. Ĉio kion li diris kaj faris estis derivita el liaj pensoj pri la demandoj: kio estas la lingvo, kaj kiel ĝi progresos.

La prilingvaj ideoj de Dreier estis iom malatentataj ĝis nun, pro bonaj kaj malbonaj kialoj. La socialdemokrata (kaj same la komunista) historiografio ne estis tre entuziasma pri la radikala sennaciismo de Dreier kaj sekve ne ekzamenis ĝin funde. La plena verkaro de Dreier ne estis eldonita ĝis 2003, kvankam jam Georg Brandes (1842-1927) sugestis fari tion. Dreier certe ne kaŝis sian lingvorevolucian sintenon en siaj presaĵoj, sed la plenan bildon oni ricevas nur en la postlasitaj manuskriptoj. La sekcio “Lingvoscienco” estas la plej granda en lia plena verkaro, kaj la plej longa ĉapitro de tiu sekcio estas granda, ne tute finita manuskripto titolita “Lingvaj statoj kaj streboj en Nordio. La provo de ĝenerala lingvo”.



Oni povus opinii ke Dreier devus kontaktiĝi kun Weitling por diskuti ilian komunan intereson pri monda lingvo, sed ili estis tro malsimilaj. Dreier estis ja ateisto, sed favoris gradajn kaj pacajn reformojn, male Weitling estis Kristane fondita kaj sufiĉe romantikema koncerne perforton. En la plena verkaro de Dreier, Weitling estas menciita nur du-tri fojojn preterpase, kaj sen rilato al lingvo. Dreier do korespondis kun neniu pri sia lingva filozofio.

Estante gradisto, Dreier tamen neniel timis provokadi. Unue li komplete malestimis la *dialektojn*, inkluzive la Norvegan kaj la Feroan (kiujn oni tiutempe ne konsideris apartaj lingvoj). Certe la homoj laŭ Dreier libere uzu la parolformojn kiuj plej plaĉas al ili, sed li estis konvinkita ke Danaj civitanoj en la longa daŭro preferos la norman Danan lingvon, ĉar la komuna lingvo ebligas pli da eduko, pli da komunikado inter la landopartoj kaj la sociaj klasoj, mallonge: pli da progreso.

Sed Dreier ankaŭ komplete fajfis pri *la Dana lingvo*. Ekzistas ja multe pli da scienca kaj revolucia literaturo en la grandaj lingvoj ol en la malgrandaj, do se la Danoj grade transiros al la Germana (komencante en suda Jutlando), tio estos nur avantaĝo por ili mem kaj progreso por la socia evoluo.

Sed Dreier ankaŭ komplete indiferentis pri *la Germana kaj la aliaj grandaj naciaj lingvoj*. En la manuskripta kolekto de la Reĝa Biblioteko en Kopenhago troviĝas manuskripto de la fama lingvisto Rasmus Rask (1787-1832), kiu skizas kiel oni povus formi komunan lingvon uzante la plej vaste konatajn vortoformojn de la Eŭropaj ĉeflingvoj, kaj difinante simplan, facile lernotan gramatikon – ne malsimile al Esperanto. Dreier elfosis tiun projekton kaj multe laŭdis ĝin.

Sed eĉ la Rask-aj principoj de *internacia lingvo* ne kontentigis Dreier-on! Li karakterizis la projekton kiel “populara provo” kaj antaŭvidis ke ĉiuj naciaj lingvoj kunfandiĝos, en procezo kie ili pli kaj pli scienciĝos. Ili unuiĝos en universala matematika lingvo, kiu la tutan tempon progresos laŭtakte kun la scienco, kaj sekve estos pli kapabla ol iu lingvo antaŭe ekzistinta.



Rasmus Rask

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kiel kvante lokiĝas Esperanto en homaj lingvoj?



Haitao Liu (1962-) doktoriĝis pri lingvistiko. Elstara profesoro de lingvistiko ĉe Universitato Zhejiang (Hangzhou). De 2016 estas ankaŭ gvida profesoro ĉe Universitato de Fremdaj Studoj en Guangzhou. Aŭtoro de ĉ. 180 sciencaj verkoj pri lingvoj kaj lingvistiko. Ĉefaj esplorkampoj: kvanta lingvistiko, dependa gramatiko, interlingvistiko, lingvo-planado. Membro de la Akademio de Esperanto (2016-).

Kial kvante?

Ekde la dua duono de la 20a jarcento, la homa socio eniris la informan epokon. Ni estas vivantaj en la mondo ĉirkaŭita de informoj. Unu el la ĉefaj portantoj de informoj estas lingvo. Logike, lingvistiko (scienca esploro pri homaj lingvoj) estus grava en la informa epoko. Sed en perkomputila lingva prilaborado, kio estas unu el la plej gravaj kampoj en artefarita inteligenteco (AI), estas tre malmultaj lingvistoj. Unu el la kialoj de tio eble estas, ke tradicia lingvistika esplorado ignoras la probablan naturon de homa lingvo. Por esplori la probablan aŭ statistikan aspektojn de lingvo nur introspekta metodo ne estas sufiĉa. Fakuloj en perkomputila lingva prilaborado disvolvis multajn efikajn komputilajn programojn bazitajn en grandskalaj naturaj lingvo-tekstaroj. Iliaj sukcesoj iugrade profitas el la probableco de homaj lingvoj pli ol antaŭaj metodoj. Sekve, por statistike malkovri la strukturajn kaj evoluajn leĝojn de la lingvo, la lingvistoj ankaŭ devas uzi grandskalajn lingvo-datumojn. Tiamaniere, lingvistoj eble ludos pli gravan rolon en la epoko de AI.

Esperantologio estas lingvistika branĉo por science esplori Esperanton. Tial la uzo de datumaj kaj statistikaj metodoj en esperantologio ankaŭ estos esenca parto de esperantologio nuntempa.

Tiu ĉi eseo skizas kelkajn atingojn pri la pozicio de Esperanto inter homaj lingvoj, precipe, la lingvatipologia trajto de Esperanto. Kiel dirite en la titolo, ni *kvante* esploras la demandaron. Ĉi tie *kvante* signifas ke la esploristoj povas ne scipovi la lingvon, sed nur uzi sciencajn (aŭ statistikajn) metodojn por analizi la lingvon, kaj poste akiri objektivajn rezultojn. Evidente, tio ne taŭgas por ĉiuj kampoj de lingva

esplorado. Tamen la aliro estas ja komuna metodo en multaj kampoj de scienco. Ekzemple, ni apenaŭ povas vidi sciencistojn en aliaj kampoj, kiuj devas fariĝi formikoj por studi formikojn. Do, kial ĉiuj homoj, kiuj studas la lingvojn, devas scipovi ĉi tiujn lingvojn? Fakte, la nunaj popularaj metodoj en perkomputila lingva prilaborado ne postulas esploristojn kompreni la lingvojn, kiujn ili prilaboras.

Se kvanta lingvistiko estas scienco bazita sur reala tekstaro por precize trovi la strukturajn kaj evoluajn leĝojn de homaj lingvoj, ĉu ni ankaŭ povas difini kvantan esperantologion kiel sciencon por kvante kaj precize esplori Esperanton?

Vort-ofteco kaj Zipf-leĝo

Laŭ la kvanta vojo, la unua fareblaĵo estas kalkuli la nombron de ĉiuj vortoj en la tekstaro. Tiamaniere, ni povas akiri la vort-frekvencan liston de la tuta lingvo. Pri vort-frekvenco, unu el la plej interesaj demandoj eblas kiom da vortoj oni ende lernas por kompreni 90% de la enhavo en unu lingvo. Por planlingvo kiel Esperanto, ĉu ni povus lerni malpli da vortoj ol en naturaj lingvoj? Evidente, ni ne povas respondi tian demandon nur per kelkaj malgrandaj tekstoj. Tabelo 1 liveras la komparon inter kelkaj lingvoj bazite sur la laboroj de Quasthoff kaj liaj gekolegoj ĉe Leipzig-a universitato, kiuj uzis la plej ampleksan Esperantan tekstaron: 55 milionoj da vortoj ĝis nun (<http://wortschatz.uni-leipzig.de/de>, 2019-02-16).


Tabelo 1. Teksta kovrado de la supra-N plej oftaj vortoj kiel procento

N	Eo	Angla	Germ.	Franca	Rusa	Ĉina	Araba	Hispana
10	23,2	21,4	15,5	22,1	12,7	14,5	11,7	26,8
100	41,9	41,6	39,1	46,8	25,1	33,7	22,9	45,8
1000	60,9	63,3	59,2	66,1	43,1	50,6	44,1	64,5
10000	81,1	87,6	79,4	87,4	68,5	88,7	74,1	86,6
100000	94,3	97,6	92,1	97,6	90,0	100,0	94,1	97,7

Tabelo 1 montras, se ni regas 1000 plej oftajn vortojn en 8 lingvoj, ni povas kompreni ĉirkaŭ 60% (Esperanto, angla, germana, franca kaj hispana) de la enhavo, tamen oni nur povas kompreni malpli ol duonon de la enhavo en rusa, araba kaj ĉina lingvoj. Unuflanke, tiuj ĉi datumoj ne diras al ni, ke Esperanto estas vorte pli malriĉa ol aliaj lingvoj; aliflanke, Esperanto estas normala homa lingvo kiel aliaj naturaj lingvoj.

La vort-frekvenco utilas ne nur al lingvolernado. Se oni ligas frekvencajn ĉiujn vortojn en la lingvo, tiam observeblas pli bone la struktura trajto de la lingvo. El multaj praktikoj, la plej fama (eble la unua) estas la Zipf-leĝo, eltrovita de la usona lingvisto George Kingsley Zipf (1935). Surbaze de multlingvaj tekstoj, Zipf trovis, ke, se oni

aranĝas ĉiujn vortojn de la teksto en tabelon laŭ ilia okaz-ofteco en malsupreniranta ordo, tiam la produkto de orda numero kaj frekvenco estas konstanto. Se la Y-akso estas frekvenco de la vortoj en la teksto, kies orda numero estas sur la X-akso, rezultas kurbo, konforma al la potenco-leĝo, kies eksponento proksimas al -1. Se X kaj Y aksoj estas logaritmitaj, ni povus akiri la rektan linion kun la deklivo de -1. Tiu ĉi kurbo ankaŭ nomiĝas Zipf-kurbo. Bildo 1 estas la distribua kurbo de vort-frekvenco de *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* de L. L. Zamenhof (sekve nomata *Esenco*).



Bildo 1. Distribua kurbo de vortoj en *Esenco*

La ekvacio de la regresa (ruĝa) linio en Bildo 1 estas $y = 3.28 - 0.984x$. Tio ankaŭ signifas, ke la kurbo de vort-frekvenco en Esperanto povas bone konformi al la Zipf-leĝo kun la deklivo de -0.984, kio preskaŭ prokimiĝas al -1.

Hodiaŭ estas tre facile por fari la kurbon kiel Bildo 1 pere de multaj tekstaraĵ programoj haveblaj el la interreto. Dum la preparado de Bildo 1, oni ne devas scipovi Esperanton. Tamen, kiel uzi Zipf-kurbon por lokigi Esperanton en homaj lingvoj?

Bujdosó (2008) kalkulis la vort-distribuon de 21 lingvoj surbaze de la teksto de la konstitucipropono de Eŭropa Unio. Laŭ lia statistiko, tiuj ĉi 21 lingvoj troviĝas sur kontinuaĵo de la deklivoj. En vico, la lingvoj estas: finna, estona, hungara, litova, latva, slovaka, ĉeĥa, pola, slovena, malta, Esperanto, greka, dana, sveda, germana, itala, portugala, hispana, franca, nederlanda kaj angla (Bildo 2, blua linio).

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Aspektoj

Sergio Pokrovskij naskiĝis la 15an de decembro 1949 en Taŝkento. De 1966 loĝas en Novosibirsko (Siberio). Fakulo pri matematiko kaj komputado, laboris en Novosibirska Komputa Centro, Sun Microsystems, Intel; nun emerito. Esperantiĝis en 1980. Esperanto-tradukisto (i.a. de *La Majstro kaj Margarita* de Bulgakov, 1991), gramatikisto, terminologo kaj membro de la Akademio de Esperanto de 1995.

1. Rapida enkonduko

Konsideru ekzemplan frazon:

(1) Kiam la kuracisto venis, la paciento *jam mortis*, sed danke al la nova kuracilo hodiaŭ li fartas iom pli bone.

Por multaj esperantistoj (inter aliaj, por mi kaj por la aŭtoroj de PAG — vd ties §246) tia frazo estas absurda kaj korektenda:

(2) Kiam la kuracisto venis, la paciento *jam estis mortanta*, sed danke al la nova kuracilo hodiaŭ li fartas iom pli bone.

Tiu grava senconuanco, per kiu diferencas (1) kaj (2), estas *la verba aspekto*. La koncepto estas relative nova en la lingvoscienco, kaj ofte ĝi ne estas atentata en la gramatiko kaj kursoj de Esperanto. Ĝi ne aperas en la Fundamenta gramatiketo nek en la *Lingvaj Respondoj* de Zamenhofo. Parolanto de du slavaj lingvoj, Zamenhofo komprenis ĝin intuicie kaj intuicie aplikis ĝin en sia parolo Esperanta; sed li ne povus priskribi ĝin gramatike: liatempa lingvoscienco ankoraŭ malhavis necesajn esprimilojn (kaj sufiĉe klarajn nociojn) por tio.

2. Tempo, tenso, preterito

Iuj preferus diri, ke (1) kaj (2) diferencas ne per iu mistika «aspekto», sed per la verbaj tempoj. Evidente, la du frazoj uzas malsamajn verboformojn, tamen necesas kompreni, en kio konsistas la senca diferenco de tiuj du formoj. Kaj certe ĝi ne konsistas en la *tempa plano* al kiu ili rilatas: ambaŭ estas estintaj.

Alivorte, la nocio, tradicie nomata «verba tempo», ne tute trafe, ne plene priskribas la signifon de la koncerna verboformo. Tio estas ĝena en la situacioj kie temas kaj pri la proprasenca *tempo*, kaj pri aliaj signiferoj de la koncepto (kia estas, i.a., aspekto). Tial en serioza studo preferindas uzi apartan terminon **tenso**.

Kaj ĉian tenson rilatan al la estinteco ni supernocie nomos *preterito* (laŭ la tradicio de la PIV-oj). Ambaŭ verboformoj en la ĉefpropozicioj de (1) kaj (2), *mortis* kaj *estis mortanta*, estas preteritoj; pli speciale, la unua estas la **is-tenso**, kaj la dua estas la kompleksa **ant-preterito**.

3. Verba konsisto

Por priskribi la nocion «aspekto» necesas unue esplori la semantikan konsiston de la verboj.

Laŭ PAG (§24), la verbo «esprimas ideon pri ago aŭ stato, rigardatan plenumata de iu aŭ io: *oscedas, dormu, kanti*». Kaj laŭ PMEG, «Verbo montras faradon de ago aŭ estadon en stato».

Ĉi tiuj difinoj atentis la diferencon inter **agverboj** (ekz-e «la kato *manĝas*») kaj **statverboj** (ekz-e «la knabo *kuŝas*»), la diferenco kiu malmulte nin interesas en ĉi tiu studaĵo; por eviti oftan ripetadon de «ago aŭ stato» mi nomos ĉi tiun procezan aŭ statan elementon de la verba signifo per la resuma termino **faro** (oni ja povas demandi pri ago aŭ stato: «Kion li *faras?*» — «Li *manĝas*» aŭ «Li *kuŝas*»; tio ankaŭ koheras kun la angla termino *fact*).

Ĉi tie tamen pli gravas, ke ambaŭ difinoj atentis nur la **daŭran, procezan** komponanton de la verbosignifoj; sed iuj verboj posedas krome aŭ eĉ precipe ian **rezultan** signifon. Nin interesos alia dispartigo de la verboj en du klasojn:

- la **daŭrverboj** (kiuj esprimas nur la procezon aŭ staton), kaj
- la **rezultverboj**, kiuj krome implicas ian vaste komprenatan *rezulton*.

Tia **rezulto** estas ia fina punkto, *imanenta limo* al kiu evoluas la faro, kaj kies atingo malebligas daŭrigon de la faro. Ekz-e

• *veni* signifas, laŭ NPIV, «Moviĝi tien, kie estas la persono, kiu parolas, aŭ al kiu oni parolas»; do, veninte ĝis la parolanton la venanto ne povas plu veni, la ago iĝas finfarita, elĉerpita, plenumita;

- kiam fajro estas estingita, ankaŭ la ago *estingi* ne plu sencas;
- kiam iranto *haltis* kaj staras senmove, li ne plu povas *halti*;
- por *formanĝi, malvesti, sekigi, elĉerpi, preni* tia finpunkto estas plena konsumiĝo de la «materialo»;
- por *koncipi, naski, morti* la logika limo estas statŝanĝo, apartiĝo de la ido aŭ ĉeso de vivado.

De kiam en la normala evoluo de tiaverba faro ĝi atingas sian immanentan limon, oni povas diri, ke la faro *plenumiĝis*, ke ĝi *okazis*.

Daŭrverboj estas ekz-e la agverboj *dormi, pezi, seksumi, silenti, vivi, manĝi, teni...* kaj ĉiuj statverboj: *ami, esti, ĝoji, plaĉi, stari, sidi, malsani...*

Jen kelkaj kontrastaj paroj:

Daŭra	Rezulta
iri	veni
teni	preni
havi	akiri
batali	venki, malvenki
heziti	elekti
serĉi	trovi
paroli	diri
agonii	morti
esti	iĝi

Ĉi tiun verban karakterizon, kiu distingigas rezultajn kaj daŭrajn verbojn, mi nomos **konsisto**. *Iri* kaj *veni* entenas unu saman faron (unu saman procezan komponanton); sed *veni* entenas krome la celon, la limon de la faro; matematike $veni \supset iri$.

Principe ĉiu verbo entenas daŭran elementon, tamen tiu povas esti tiom mal-longa aŭ tiom malgrava, ke oni ĝin ignoras kaj parolas pri **verboj momentaj** (sendaŭraj):

- *esti, vivi, flui, serĉi* estas verboj daŭraj kaj senrezultaj;
- *halti, preni, trovi* estas verboj rezultaj kaj sendaŭraj.

Tamen en iuj specialaj situacioj oni ja povas prezenti faron de momenta verbo kiel daŭran. Tial la distinga trajto estas enesto aŭ malesto de la imanenta limo: rezultverbo estas ĉia verbo implicanta tian limon, sendepende tion, ĉu ĝia faro estas momenta aŭ daŭra.

La terminojn *daŭrverbo* kaj *rezultverbo* mi pruntis el PAG. Iliaj ekvivalentoj naci-lingvaj estas respektive

- *непредельный, предельный глагол* (ruse);
- *atelic, telic verb* (angle).

La supernocion *konsisto* la lingvistoj mallogike nomas per la termino responda al la subnocio «rezulteco» (ruse *предельность* = «limeco», angle *telicity, boundedness*).


Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La Akademio antaŭ la karaktero de la radikoj

(Elaboraĵo kunmetita el fragmentoj de
*Historio de la Akademio de Esperanto*¹)



Carlo Minnaja (1940-), italo, emerita profesoro pri matematiko (Univ. Padova), orda profesoro de AIS San Marino, honora profesoro pri aplikata matematiko (Univ. Sibiu), ekde 1973 membro de la Akademio de Esperanto, premio de la Kulturo de la itala Ĉefministro (1991); honora membro de Itala Esperanto-Federacio; ĝenerala sekretario de TEJO (1963-1966), direktoro de la Itala Esperanto-Instituto (1967-1977).

La Akademio de Esperanto, kiel estas ĝis rolo, troviĝis plurfoje antaŭ dilemoj kiuj parte dividis ankaŭ la ordinaran publikon. La diskuto pri *-ujo/-io* eksplodis post la unua granda milito, tiu pri *-ata/-ita* ekvivis, tamen tiam dampita, jam mallonge antaŭ la dua kaj eksplodis en la 1960aj jaroj. Multe pli frua estis la demando pri la kategorieco de la radikoj. Tio apenaŭ montriĝis demando, ĉar se ja veras, ke la vortolisto de la *Unua libro* (ĉ. 920 radikoj) havis la radikojn tradukitaj per plena vorto (kiu do havis sian gramatikan kategorion), kiam oni uzis jam en la unuaj verkoj la adjektivon, aŭ verbon aŭ adverbbon derivitan de tiu radiko neniu ordinara uzanto pensis, ke tiu derivado krizigas la kategorion, kiun la vortaro en la *Unua libro* estis atribuinta tra la traduko. La postaj vortaroj, rapide sekvantaj unu la alian, elektis prezenti radikojn kiel kategoriohavan pere de la tradukoj.

La *Plena Vortaro Rusa-Internacia* (fine de 1888) listigas 500 pliajn radikojn kaj la *Meza Vortaro Internacia-Germana* (komence de 1889) preskaŭ same, sed Zamenhof konsideris tiujn du verkojn “privataj”. La *Universala Vortaro* (UV) aperas meze de aŭgusto 1893 (kun nenial klarigita dato 1894) kaj ĝiaj radikoj ne multe diferencas de tiuj de la *Meza*. Kelkaj vortaroj disverslingvaj intertempe aperis, tiu de Beaufront (1902) prenas kiel bazon la *Universalan Vortaron* kaj havos tre rapide plurajn eldonojn; pri ajna modifo aŭ aldono li konsultiĝis kun Zamenhof, same kiel li faris pri la Gramatiko.

Kontrapunkte al la vortaroj aperis la demando pri vortfarado, stimulita de la kritikoj de la idistoj, kaj, kune kun ĝi, la demando, ĉu la radikoj havas en si mem gramatikan karakteron. Startigis la diskuton verko de Georges Kolowrat, *Pri la derivado en Ido kaj en Esperanto*². En ĝi la aŭtoro kritikis la fakton, ke Ido atribuas al la radikoj gramatikan karakteron (verba, ne-verba), dum, male, “Esperanto [...] ne havas

kaj ne bezonas arbitran distingon inter verbaj kaj ne-verbaj radikoj.” Laŭ Kolowrat derivado estas returnebla, se oni povas pasi de unu vorto al alia laŭ iu regulo kaj de la alia al la unua, laŭ regulo mala. Ido ne posedas returneblecon, ĉar ĝi distingas inter radikoj verbaj kaj ne-verbaj, kaj lernanto devas serĉi en vortaro la kategorion de la origina vorto. En la sistemo de Kolowrat, cetere de li elpensita jam en 1904, la senco de la finaĵoj estas: *o* – kio estas, *a* – kia estas, *i* – esti. Ridindigo de Ido estis, ke en Ido estas verbaj *vals-*, *signifik-*, *lud-*, *anunc-*, dum estas neverbaj *polk-*, *senc-*, *sharad-*, *afish-*. Male al ĉi tiu klara pozicio de Kolowrat, alian vojon elektis Boirac kaj René de Saussure, kiuj akceptis la ideon, ke ankaŭ la Esperantaj radikoj havas gramatikan karakteron. En la franclingva verko *La construction logique des mots en Espéranto*³, Saussure atribuis al leksikaj morfemoj iujn ideojn: *grand-* havas ideon de kvalito, dum *hom-* havas ideon de substanco. Sed tuj poste tiu “ideo” transformiĝas al gramatika karaktero, kvazaŭ *grand-* egalus al *granda*. Do la teorio, ke ekzistas tri gramatikaj klasoj de la radikoj (substantivo, adjektivo, verbo) komencis firmiĝi. Tiu teorio baziĝis ankaŭ sur la fakto, ke UV konsideris la radikojn, ne ja la vortojn, sed tradukis ilin per plenaj vortoj, kiuj estis en la kvin naciaj lingvoj kiuj estos enprenitaj de la (posta) Fundamento, ĉiu kun sia gramatika kategorio, do jen per substantivo, jen per adjektivo, jen per verbo. Senkonsidere al la fakto, ke UV havis la tradukojn en nur kvin eŭropajn lingvojn, la leksikona evoluo kaŭzis, ke en la vortaroj tiu kategorio estis, por kelkaj vortoj, ŝanĝita (arbitre?) en posta tempo de aŭtoritataj vortaristoj, do la elekto de unu aŭ alia kategorio por kelkaj radikoj ne estis pravigita per nediskutinda evidenteco.

René de Saussure estis matematikisto el Ĝenevo, preskaŭ hazarda vizitanto de la ĝeneva UK komisie de sia frato, la fama lingvisto Ferdinand de Saussure, kiu ŝajne ne volis aperi oficiale kiel partoprenanto en kongreso de Esperanto⁴. Ĉe tiu kongreso René fariĝis esperantisto, poste kunfondinto de ISAE kaj redaktoro de ĝia organo *Scienca Revuo*. En 1907 li disponigis oficejon por la administrado de la revuo *Esperanto*⁵. Zamenhof alte aprezis la verkon de Saussure kaj skribis al li: “Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon.” La Akademio tamen akceptis nur parte la teorion de Saussure, specife la “principlon de neceso kaj sufiĉo”.

Intertempe, en 1907, estis aperintaj du tute similaj verkoj, ambaŭ 100-paĝaj: *Étude sur la dérivation en Esperanto*, kaj *Étude sur la dérivation dans la langue internationale* (duaj eldonoj por ambaŭ aperis en 1910 kaj disvastiĝis tre pli multe). Ilia aŭtoro estis Louis Couturat, kiu faris plurajn kritikojn al la Esperanta sistemo de vortformado, temo pri kiu ekzistis ĝis tiam neniu oficiala starpunkto, krom la regulo 11a de la Fundamenta Gramatiko kaj la § 27 de la Ekzercaro. Al tiuj kritikoj Saussure volis rebati. Lia broŝuro *La logika bazo de vortfarado en Esperanto* aperis en 1910, eldonite de UEA, sub la pseŭdonomo “Antido”; ĝi estis propono al la Akademio okaze de la Sesa UK en Vaŝingtono.⁶ La unua punkto estas, ke “la vortfarado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj

ne sur tiel nomitaj «reguloj pri derivado». La dua punkto estas, ke la Akademio, rimarkinte troan uzadon de sufiksoj, rekomendu al la aŭtoroj la du sekvajn principojn:

Principo de neceso: En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝon necesajn por esprimi klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

Principo de sufiĉo: Oni devas kiel eble plej eviti dufojan ripeton de la sama ideo en la sama vorto, kaj oni ne devas enkonduki en la vorton fremdajn ideojn ne entenatajn en la ideo esprimata.

Por ebligi aplikon de tiuj du fundamentaj principoj, l' Akademio opinias, ke oni devas doni al la finiĝoj *-o*, *-a*, *-i*, *-e* ne nur gramatikan rolon, sed ankaŭ difinitan logikan sencon, jene:

Finiĝo -o (substantiva) enhavas ĝeneralan sencon de *ento*⁷, tiu ento estante⁸ ĉu persono, *viva ento (-ul)*, ĉu *neviva ento [abstrakta aŭ materia] (-aĵ)*.

Finiĝo -a (adjektiva) enhavas ĝeneralan ideon de *kvalito aŭ karaktero (-ec)*, aŭ de *rilate al*.

Finiĝo -i (verba) enhavas⁹ ĝeneralan ideon de *ago aŭ stato (-ad)*.

Finiĝo -e (adverba) enhavas ĝeneralan ideon de *maniero*.

Tio iamaniere egaligas finaĵon *-o* al *-ul* aŭ *-aĵ*, *-a* al *-ec* kaj *-i* al *-ad*. Saussure klasas la vortradikojn kaj la afiksojn laŭ la samaj klasoj kiel la vortfiniĝoj referencante al UV, kaj li konkludas: “La tuta konstruo logika de la vortoj en Esperanto estas fondita sur tiu klasado de la vortradikoj, afiksoj kaj finiĝoj, laŭ la *ĝeneralaj ideoj* entenataj en ili.” La apliko de la principoj de neceso kaj sufiĉo, kune kun tiu klasado, kuntrenas, ke oni povas sintezigi *skribado* al *skribo*, ĉar la verba sufikso *ad* estus nenecesa ripeto de la verba radiko *skrib*; oni ne povas ellasi *ad* ĉe *kronado* ĉar *kron* estas substantiva; oni povas ellasi *ec* ĉe *frateca*, ĉar jam finaĵo *-a* donas ideon de kvalito.

La gramatika kategorio estas, laŭ Saussure, fiksita de UV; li aldonas, ke, surbaze de la principo de sufiĉo oni povas diri *virgino* anstataŭ *virgulino*, ĉar la ideo de individuo estas jam entenata en *in*; tamen oni ne povas ion ellasi ĉe *samideanino*, ĉar kvankam *an* kaj *in* enhavas saman ĝeneralan ideon pri individuo, tamen *in* aldonas ion specifan. Tiu klasado cetere estis sugestita de Boirac jam en 1907.

La principo de neceso kaj sufiĉo estas esprimata kiel sekvo de la homa instinkto fari la plej malgrandan penon. Saussure respondas tiamaniere al Couturat, kiu estis kritikinta la deriv-sistemon de Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Ludovika pretervido

Jean-Luc Tortel (1930-), franco, studis beletron en Sorbono, sed iĝis kuracisto en la malfacila postmilita periodo, ĉar tio tiam estis pli sekura pri vivolukro. Esperantisto ekde 1949. Kiel membro de Franca Esperanto-Instituto gvidis kursojn skribajn, per-vortajn, perretajn, kaj staĝojn en Greziljono kaj Bureso, organizis ekzamenojn, re-verkis kaj editoris *Cours Rationnel d'Espéranto*, tradukis kelkajn librojn en Esperanton.

Iam Esperanto trafis nin. La startilo estis gazeta informo pri kongreso; aŭ malnova libro ĉe brokantisto; aŭ aŭdo pri “kreita lingvo de pola okulisto”; aŭ eltrovo hazarda en la Reto...

Poste venis la lernado, en klubo, aŭ sola per libro, aŭ per komputilo... Ni mire ekvidis, ke Esperanto ebligas multe pli facilan kaj intiman rilaton kun Ĉeĥo, Ĉino aŭ Ĉiliano, ol per la angla lingvo. Banalaĵo por ni nun, sed ia miraklo, tamen...

Jes, ni lernis Esperanton en miro. Memoru: la gramatiko estis tre simpla kaj logika, kaj la komparo kun lingvoj instruataj en lernejo estis ege favora al tiu alloga nova idiomo. Konjugacio estis simplega: *-is, -as, -os*, kaj por pli kompleksaj tensoj, *est/ is, as, os* ligebla al *ant, at; int, it; ont, ot*.

Venis dua grava momento: la renkonto kun Fundamento. Oni instruis, ke ĝi enhavas absolute ĉion necesan; ke ĝi estas netuŝebla, neŝanĝebla, kvazaŭ Biblio. Ĝi entenis gramatikon kvin-ses paĝan, kun fiera nomo Plena Gramatiko, poste Ekzercaron, kaj trie leksikonon kun denove iom bombasta titolo: Universala Vortaro. En la tuta libreto nenio surprizis aŭ ŝokis nin.

Mi eklernis la lingvon en 1950, kaj vizitis Grésillon la unuan jaron de ĝia ekzisto. Ĉeestis kelkaj “eminentuloj”, kaj kvankam ili kaŝis tion al komencantoj, sentebla estis kverelo inter Esperantistoj pri la konjugacio. Ni komprenis, ke temas pri la uzo de *estis -ita* aŭ *-ata*. Tio ŝajnis al ni bizancisma harfendaĵo seninteresa.

Sed la sufleo iom post iom ŝvelis dum la 1950aj jaroj, ĝis fariĝi en la 1960aj vera interna milito, flamanta en la gazetaro. Mi memoras la akrecon de mia kutime milda amiko Jean Thierry, la tondrojn de la voĉo de Ivo Lapenna, la surprizigan koleron de Raymond Schwartz, kiu pli kviete kutimigis nin al blagoj kaj spritaĵoj...

Ĉe tiu uzo de *-ita* kaj *-ata*, unu klano insistis, ke *-ita* indikas finitecon de l' ago,

kaj -ata ĝian daŭron aŭ ripeton, kaj ke tio respondas al la Zamenhofa uzo. Mi mem akceptis tiun vidpunkton pro la fama Fundamenta frazo *Georgo Vaŝington estis naskita la 22/2/1732*. Oni nomis la adeptojn de tiu koncepto: *itistoj*. Ĉiuj, eĉ la kontraŭantaj *atistoj*, konsentis, ke Zamenhof plejofte verkis "itisme".

Sed la flanko de la *atistoj* prave rimarkigis, ke la "Biblia" Fundamento neniel entenas tiun ideon de fino por *-it* kaj daŭro-ripeto por *-at*. Ili interalie diris: "Kiel oni distingas la ĝustan signifon de verbo, se *estis -ita* rajtas indiki la simplan paseon (kiel en la ekzemplo pri G. Vaŝington) kaj la kompleksan paseon, tio estas paseo en la paseo (ekz. kiel kompreni: *mia frato estis naskita kiam mi estis naskita*)?" Krome la komplikaĵo de itismo, kiu aperas en §105-110 de la gramatiko PAG de Kalocsay kaj Waringhien ŝajnas nekonvena al internacia lingvo celanta al facileco, kompare kun la klara simpleco de la Plena Gramatiko Zamenhofa en la Fundamento.

Kia afero! Zamenhof kreas simplan atisman Plenon Gramatikon en la Fundamento, kaj tuj poste li verkas itisme en sia Vaŝingtona ekzemplo, kaj pli malpli daŭrigas en sia tuta verkaro!

Subite mi komprenis, kial itistoj pravas, kaj atistoj ankaŭ pravas! Ambaŭ ja pravas, kio ŝajnas neebla. Zamenhof kreis atisman gramatikon (relegu ĝin, se vi dubas), kaj li tuj kaj plue plejofte skribis "itisme". Konsekvence de *la pordo estas fermita* en §6. i) en la PG-konjugacio li devus skribi: *G. Vaŝington estas naskita... aŭ estis naskata...*

Mi konfesas, ke mi neniam ĝis antaŭ nelonge rimarkis, ke la Vaŝingtona ekzemplo kolizias kun la Plena Gramatiko. Kaj vi? Sincere? Ĉu vi jam rimarkis la nekongruon inter PG kaj la posta Vaŝingtona frazo?

Kompreneble Zamenhof ne intencis tiun nekongruecon. Do? Do kulpas liaj naciaj slavaj lingvoj, en kiuj la itismo ekzistas, male de la okcidentaj idiomoj latinidaj aŭ ĝermanidaj. Tio nomiĝas "aspektismo". Senpripense, nevole, sekve senklarige li uzis sistemon tute normalan por slavlingvanoj kiel li. Kaj neniu rimarkis tion dum tri jardekoj; dum lia tuta vivo, neniu levis al li la demandon.

Sed la fama paro Kalocsay-Waringhien ekpelis la leporon. Jam dum la komencaj 1930aj jaroj ili ellaboris sian faman PAG, t. e. Plena Analiza Gramatiko (Analiza estis necesa aldono, ĉar Plena Gramatiko jam estis la titolo de la Zamenhofa gramatiko de Fundamento). Tuj ekde la apero (mi posedas la unuan eldonon de 1935) PAG proponas interalie unu "ŝatatan ĉevaletan" de niaj Kastoro kaj Polukso de Esperanto, t. e. la aspektismon de *-ita*.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Germanio

Sabine Fiedler estas profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Leipzig (Germanio). Ŝi doktoriĝis en 1986 per disertacio pri angla faklingvo kaj habilitiĝis en 1999 en ĝenerala lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj. Ekde 2011 ŝi estas la prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

1. La disciplino pri la studado de planlingvoj

Interlingvistiko estas fako, kiun oni komprenis kaj difinis diversmaniere. Ampleksajn superrigardojn pri la diversaj aliroj donis Schubert (1989), Sakaguchi (1998) kaj ĉefe Blanke (multloke, laste 2018). Malgraŭ ĉiuj diferencoj, esploristoj samopiniias pri tio, ke la ĉefa esplorbjekteto de interlingvistiko estas planlingvoj kaj planlingvaj projektoj. Planlingvoj, laŭ la difino estas “konscie kreitaj lingvoj por faciligi la internacian komunikadon inter malsamlingvuloj” (Blanke 2018: 26).

La termino planlingvo estas traduko de la germana “Plansprache”, kiun Eugen Wüster, la kreinto de terminologia scienco, enkondukis en sia doktora disertacio en 1931. La historio estas verŝajne sufiĉe konata, inter alie el la verko de Detlev Blanke (1985): Otto Jespersen en sia libro “An international language” (1928, London), en kiu li priskribas sian propran planlingvan sistemon Novial, uzis “constructed language” (konstruita lingvo). Tiu termino estis tradukita al “konstruierte Sprache” en la germanlingva versio de la verko (traduko de Auerbach 1928, Heidelberg), kiu havas strangan kromsentonsencon de “artafekta” aŭ “afektita”. Pro tio Eugen Wüster malakceptis ĝin preferante “plansprache” (planlingvo). Kvankam la termino tute ne estas ideala (la genezo de lingvo – ke ĝi estas planita aŭ konscie kreita – ja nenion eldiras pri la taŭgeco aŭ esprimivo de lingvo), ĝi intertempe akiris ĝeneralan akcepton en la germana kaj Esperanto (Plansprache/planlingvo). En la angla “constructed language”, “auxiliary languages”, aŭ “artificial language” estas ofte preferataj (kp. la verkojn de Michael Gordin 2015, James McElvenny 2018, Roberto Garvía 2015 kaj Stephen Anderson et al. 2018).

Esperantologio estas speciala subdisciplino de interlingvistiko. Multaj fenomenoj en la planlingva tereno estas dokumenteblaj nur je la ekzemplo de Esperanto, ĉar

nur ĝi evoluis de projekto al plene funkcianta lingvo kun sufiĉe granda parolkomunumo kun komencoj de memstara kulturo kaj signo de lingvoŝanĝiĝo. Esperantologio ne nur studas la lingvan sistemon, sed same okupiĝas pri komunikado pere de tiu lingvo kaj la kulturaj produktoj en ĝi.

2. Atingaĵoj kaj dezirindaĵoj

En 2017 aperis superrigarda artikolo pri Esperanto kiel esplorobjekto de Asya Pereltsvaig, en kiu la aŭtorino prilumas la evolustaton de esperantologio en diversaj terenoj de la lingvosistemo, menciante studojn pri fonologio, morfologio, gramatiko kaj frazeologio kaj krome laboraĵojn pri pli aplikataj terenoj kiel genro, humuro, Esperanto kiel denaska lingvo, normigado, lingvolernado kaj socilingvistiko. Por kompletigi la superrigardon de Pereltsvaig (2017) oni povus aldone menci i aŭtorojn, kiuj studas Esperanton en la sekvaj terenoj: minoritataj lingvoj, tradukscienco (beletro kaj maŝintradukado), lingvoekonomiko, pragmatiko¹. Ni krome konsideru la studojn freŝdatajn, kiuj traktis planlingvojn ĉefe kiel socihistorian fenomenon: Garvía (2015), Schor (2015), Kamusella (2015), Gordin (2015), Feierstein (2017) kaj Anderson & L. de Saussure (2018). Tiuj aŭtoroj studas planlingvojn ĉefe kiel socihistorian fenomenon, serioze kaj ene de universitataj strukturoj.

Se ni prijuĝu la evolustaton de interlingvistiko/esperantologio laŭ tiu superrigardo ni povus diri, ke ĝi estas elstare bona, ĉar ni devas konsideri la kondiĉojn de nia laboro. Esploroj pri Esperanto kaj interlingvistiko estas ĉefe farataj de specialistoj de diversaj (aliaj) fakoj aldone al la ordinara laboro. La fako ne estas integrita parto de universitataj strukturoj (krom, je certa grado, la esceptoj de Poznano kaj de Amsterdamo eble). Ne ekzistas iu larĝa bazo de studentoj, kiuj ĉiujare finas studadon en tiu fako per scienca laboraĵo (ĉu sur la niveloj de Bachelor aŭ Master), el kiuj eble elkreskas kandidatoj por doktorigaj disertacioj. Sub tiuj kondiĉoj la ekzisto de tiom riĉa esplorkampo interlingvistiko/esperantologio estas mirige bona rezulto. Kompare al aliaj fakoj tamen la esplorpejzaĝo de interlingvistiko havas ege vastajn neprilaboritajn kampojn.

Inter tiuj dezirindaj aŭ eĉ necesaj estontaj esplorotemoj estas i.a. la studo de **Esperanto kiel uzata lingvo**. Ĉiu parolanto de la planlingvo konas la ĝeneralajn reagojn de homoj ĉe mencio de Esperanto: “Esperanto? Mi ne sciis, ke tio ankoraŭ ekzistas”. Ŝajnas al mi, ke la bildo en sciencaj rondoj, inkluzive de lingvistiko, estas iom simila. Bone edukitaj homoj kompreneble scias, ke ekzistas tiu lingvo, eble ankaŭ, kia ĝi estas, kiu kreis ĝin ktp. Sed malmultaj scias, ke ĝi estas vere uzata. Ni metu tiun uzon ankaŭ en la centron de niaj esploroj. Lingvistiko hodiaŭ estas uzobazita. Sed kiamaniere Esperanto-parolantoj vere uzas la lingvon, kiel ili prezentas argumentojn, klopodas preventi miskomprenojn, kiamaniere ili negocas enhavojn de vortoj kaj terminoj, reagas en okazo de miskompreno, kion ili faras, kiam mankas leksika unuo, kiel ili riparas komunikadon, ĉu ili uzas aŭ eble evitas idiomaĵojn kaj

metaforojn, ĉu entute ili komunikas en iu internacia maniero aŭ simple transprenas siajn konduktajn kaj komunikadajn strategiojn el siaj etnaj lingvoj kaj kulturoj? – tio estas ege interesaj demandoj, sed ili ne estas esplorataj en Esperanto.

Studoj pri la reala uzo de Esperanto gravas por la pluevoluigo de Interlingvistiko. Ili krome helpas, ke la lingvo estos rimarkata ekstere de la komunumo kiel tio kio ĝi estas – komunikilo praktike aplikata.

Dua ĝis nun ne sufiĉe prilaborita esplortemo estas **la varieco de Esperanto**. Di-verseco, do la ekzisto de lingvaj variantoj (de t. n. funkciaj stiloj, kiel ekz. la ĉiutaga lingvo, la faka lingvo) estas karakterizaĵo de lingvoj. Ankaŭ en Esperanto ni spertas, ke poemo kaj universitata prelego diferencas. La unua riĉas je retorikaj figuroj, la dua je terminoj, por iomete simpligi la aferon. Tamen ŝajnas al mi, ke la uzo de Esperanto en la diversaj stilaj funkcioj (inter kiuj kelkaj verŝajne tute ne ekzistas, kiel ekz. la tavolo de oficial-burokrata aŭ jura lingvouzoj) same kiel la parola kaj la skriba uzo de Esperanto ne tiel altgrade distingiĝas kiel en etnolingvoj. Aliflanke de tempo al tempo oni aŭdas aŭ legas, ke Esperanto posedas propran junularan lingvaĵon aŭ ĵargonon. Esploroj pri tiuj fenomenoj laŭ mi tute ne ekzistas, sed necesas.

Speciale gravas laŭ mi la varieco sur la diakrona ebena. Detlev Blanke (2000) priskribis la evoluojn de planlingva projekto al plene funkcia lingvo surbaze de 28 kriterioj (de “manuskripto” kiel la unua etapo ĝis lingvoŝanĝiĝo kiel la plej alta). Do Esperanto estas lingvo, ĉar ĝi evoluas kaj posedas historian (aŭ diakronan) ebenon. Por multaj lingvistoj tio vere estas decida kriterio de lingveco. Post 130 jaroj da komunika historio sendube ekzistas diakrona ebena de Esperanto, sed malmultas esploroj. Konataj al mi estas nur tri: Philippe (1991), Blanke (2010) kaj Piron (1989). Inter tiuj la laste menciita kaj la plej malnova estas verŝajne la plej grava, ĉar ĝi baziĝas sur datumoj. Piron montras trajtojn de la evoluo de Esperanto sur diversaj ebenaĵoj de la lingvosistemo per ekzemploj el la fakta lingvouzo (kiujn li kolektis dum kongresoj aŭ en la literaturo).

Per tiu ĉi rimarko mi venas al konkludo, kiu rezultas el la du esplorproponoj. Se interlingvistiko/esperantologio volas kontribui al lingvistikaj esploroj, se ni volas esti akceptita fako, ni ankaŭ devas uzi la rimedojn kaj metodojn de lingvistiko. Moderna lingvistiko estas uzobazita, ĝi prenas datumojn de fakta lingvouzo kiel elirpunkton. Kion ni do bezonas por nia laboro estas pli bonaj korpusoj. La nunaj, mi rilatas ĉefe al tekstaro.com,² estas bona komenco, kiu lastatempe fariĝis pli kaj pli alirebla, sed ĝi estas tute ne sufiĉe ampleksa.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Planlingvistikaj konferencoj en Uralo



Halina Gorecka (1959-), ruslandanino, studis matematikon kaj laboris kiel komputistino en projekta insituto ĝis 1991, kiam ŝi kun sia edzo Aleksander Korĵenkov eklaboris profesie per Esperanto kiel redaktoro kaj eldonisto. Plenumis multajn movadajn kaj kulturajn taskojn loke, lande kaj internacie, redaktis *Ruslandan Esperantiston* (1991-2001), verkis centrojn da artikoloj kaj recenzoj, kunaŭtoro de la enciklopedio *Nia diligenta kolegaro* (2018).

Komence de la 1980aj jaroj interlingvistikaj prelegoj ofte okazis en la programoj de Vesperaj Universitatoj, kiuj funkciis en kelkaj Esperanto-kluboj en Uralo (Ruslando). Urala Esperanto-Komitato (UEK), fondita en aŭgusto 1982 (Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Aleksandr Mikiŝev, Andrej Peĉonkin), decidis, ke esperantologio/interlingvistiko/planlingvistiko estu unu el la prioritataj agad-direktoj. Ĝi proponis levi la nivelon de ĉi tiu agado per regula okazigo de konferencoj laŭ la modelo de konferencoj pri interlingvistiko kaj esperantologio en Samarkanda Ŝtata Universitato (Uzbekistana SSR) kadre de studentaj sciencaj konferencoj.

Tiutempe en la Sovetuniaj superlernejoj (universitatoj kaj institutoj) funkciis studentaj sciencaj societoj, inter kies taskoj estis ankaŭ organizado de sciencaj konferencoj. Tiuj konferencoj okazis kutime en printempo, kaj inter la sekcioj povis esti ne nur tiuj, kiuj rilatis al la studobjektoj de la koncerna superlernejo, sed ankaŭ tiuj, kiuj ne estis en la studprogramoj. Krome, tiuj konferencoj estis malfermitaj, kaj ilin povis partopreni ankaŭ eksstudentoj kaj studentoj de aliaj urboj aŭ superlernejoj.

La unua Urala Konferenco pri Planlingvoj (UKP) okazis la 30an de aprilo 1983 en Sverdlovsko (nun: Jekaterinburgo) kadre de scienca seminario ĉe Sverdlovska Pedagogia Instituto (SPI). Pri la kontaktoj kun la instituto okupiĝis Andrej Peĉonkin, diplomigonta studento de la fremdlingva fakultato de SPI. La konferenco pasis kiel kunveno de la sekcio interlingvistiko/esperantologio. La dek prezentitaj raportoj provokis plurajn demandojn de la partoprenantoj, inter kiuj estis ankaŭ kelkaj instruistoj el la fremdlingva fakultato de SPI. La gvidantino de la studenta scienca societo Natalja Postolovskaja faris la ferman parolon en la konferenco. Antaŭ la komenco kaj en la paŭzoj funkciis ekspozicio de interlingvistika literaturo. Kvankam kelkaj

prelegoj estis ne sciencaj sed informaj (kutima afero por la printempaj studentaj konferencoj), UEK taksis la unuan provon sukcesa kaj daŭrigenda.

Unue UEK havis la ideon okazigi la konferencojn en diversaj urboj de Uralo. En 1984 la dua konferenco okazis kiel sekcio interlingvistiko/esperantologio en la scienca konferenco de Tjumena Ŝtata Universitato (TGU) kun organiza asisto de Svetlana Oljkova (nun: Borovikova), studentino de la filologia fakultato de TGU. UEK decidis, ke ĉi-foje estu prezentataj sciencaj, sed ne “vesper-universitataj” prelegoj. En la sekcia kunsido estis faritaj kvar raportoj, post kies diskutado la scienca gvidanto, supera lektoro de la universitata filologia departemento, kandidato de filologiaj sciencoj Oljgerd Usminskij menciis la altan nivelon de la raportoj kaj prezentis sian rigardon al la taskoj de interlingvistiko el la tradicia lingvistika vidpunkto.

La 3an UKP en 1985 akceptis la Perma Ŝtata Universitato (PGU). La konferenco en Permo estis organizita kiel sekcio interlingvistiko/esperantologio ĉe la scienca studenta konferenco. Estis prezentitaj ses raportoj. Gvidis la sektion Nikolaj Ponomarjov, lektoro de la filologia fakultato, kiu mem vigle partoprenis en la sekcia agado. Ĉe la fermo de la konferenco Ponomarjov emfazis la evidentan sukceson de la konferenco kaj sugestis daŭrigi la esplorojn kun konsidero de la modernaj lingvistikaj metodologiaj rimedoj.

Pro la afabla traktado kaj subteno de Ponomarjov, UKP hejmiĝis en Permo kaj Jelena Lozgaĉeva iĝis ĝia konstanta sekretario, kaj Nikolaj Ponomarjov akceptis esti ĝia scienca gvidanto. Tio ebligis pli da “daŭripovo” al la esplortemoj.

En la 4a UKP (1986) estis prezentitaj sep raportoj pri lingvistikaj aspektoj de planlingvoj. La gvidanto de la sekcio interlingvistiko/esperantologio (tiel oficiale titolis la konferencon la universitataj aŭtoritatoj) Nikolaj Ponomarjov akcentis la rimarkeblan progreson en la scienca nivelo de la raportoj kompare kun la 3a konferenco. Ankaŭ en 1987 Ponomarjov atentigis pri la kresko de la nivelo de la raportoj, prezentitaj en la 5a UKP kompare al la antaŭaj konferencoj, kio okazis certgrade danke al stabiliĝo de la temaro – plejparto de la raportintoj prezentis daŭrigon de la pli frue prezentitaj esploroj.

En la 6a konferenco (1988) estis prezentitaj ok raportoj, sed en la 7a, okazinta en PGU post du jaroj (1990) kaj dediĉita al “Planlingvoj kaj tradukologio”, estis nur du kontribuajtoj, kiuj ligis la teorion kun praktiko. Nikolaj Lozgaĉev prezentis la problemaron de la poezia tradukado je la ekzemplo de siaj tradukoj el Vladimir Vysockij, aperintaj en *La birdo Gamajun* (1989), kaj Aleksander Korĵenkov konigis la problemojn (kaj ties solvojn), kiuj aperis ĉe la tradukado de prozaĵoj de Anton Ĉeĥov en la tiam preparata novelaro *Sveda alumeto* (1991).

La baza celo, starigita en 1982, “levi la nivelon de planlingvistika agado en Uralo” estis atingita, sed la konferencoj ne plu povis okazi en la situacio, kiam Sovetunio nehaltigeble ruliĝis al kolapso, kaj preskaŭ ĉiuj “neprofitcelaj projektoj” estis fermataj.

Pri la konferencoj ofte raportis universitataj, urbaj kaj regionaj gazetoj. Artikolojn

pri la konferencoj regule aperigis *Informilo por Interlingvistoj, Ekzakte* (Informilo de UEK, poste de Urala Esperantista Societo), *Budapeŝta Informilo kaj der Esperantist* kaj aliaj Esperantaj gazetoj. Esperantaj versioj de kelkaj raportoj poste aperis artikolforme.

Vidu sube la liston de la prelegoj.

1a UKP. Sverdlovsk. Sverdlovskaja Pedagogia Instituto. 30 apr 1983.

Scienca gvidanto: Natalja Postolovskaja

1. Vladimir Izosimov. Pri la loko de planlingvoj en la monda lingvosituacio.
2. Rita Dautova. El la historio de interlingvistiko. Filozofiaj lingvoprojektoj.
3. Andrej Peĉonkin. Problemoj de la etnaj kaj planitaj lingvoj.
4. Dilara Gadirova. Esperanta vortfarado. Kelkaj karakterizaj trajtoj de la vortfaraj rimedoj en la angla kaj Esperanto.
5. Aleksander Korĵenkov. Interjekcioj kaj onomatopeoj en la planlingvo Esperanto.
6. Svetlana Oljkova. Skribo de la propraj nomoj en Esperanto.
7. Halina Gorecka. Lingvistikaj periodaĵoj en Esperanto.
8. Vladimir Kuzjmin. Uzado de Esperanto en etero.
9. Aleksandr Mikiŝev. Esperanto kiel ebla solvo de lingvaj problemoj en la internaciaj organizaĵoj.
10. Aleksander Korĵenkov. La 24a Orienta sovetia esperantista junulara tendaro OrSEJT-24.

2a UKP. Tjumeno. Tjumena Ŝtata Universitato. 19 apr 1984.

Scienca gvidanto: Oljgerd Usminskij

1. Svetlana Oljkova. La objekto kaj enhavo de interlingvistiko.
2. Nikolai Lozgaĉev. Premisoj de Esperanta slango.
3. Aleksander Korĵenkov. Pri la aplikosferoj de la planlingvoj (planlingvoj kaj literaturo).
4. Aleksander Korĵenkov. La planlingvo Volapük.

3a UKP. Permo. Perma Ŝtata Universitato. 5 apr 1985.

Scienca gvidanto: Nikolaj Ponomarjov

1. Nikolai Lozgaĉev. La reformoj de Ido kaj iliaj ekvivalentoj, aperintaj dum la natura evoluo de Esperanto.
2. Aleksander Korĵenkov. Ĉefaj leksikaj kaj fonetikaj specifaĵoj de la ruslingvaj esperantofonoj.
3. Halina Gorecka. La planlingvo Omo.
4. D. Kupĉik. Kompilado de la ofteca Esperanto-rusa vortaro.
5. D. Kukuŝkina. Aŭtomatizado de leksikografiaj esploroj.
6. Dilara Gadirova. Kunmetitaj vortoj en Esperanto.

4a UKP. Permo. Perma Ŝtata Universitato. 5 apr 1986.

Scienca gvidanto: Nikolaj Ponomarjov

1. Boris Kolker. Evoluo de Esperanto.
2. Sergej Straŝnenko. Fonematika aparteno de la sonoj “ŭ” kaj ”ĥ”.
3. Aleksander Korĵenkov. Tipaj morfologiaj specifaĵoj de la ruslingvaj esperantistoj.
4. Viktor Kudrjavcev. Kompara analizo de la artikolo “la” en la tekstoj de la rus-kaj ali-lingvaj esperantistoj.
5. Halina Gorecka. Uralaj toponimoj en Esperanto.
6. Gafur Gazizov. Kunmetitaj vortoj en Esperanto.
7. Larisa Kuzjmenko. Al la demando pri la stilaj specoj en Esperanto.

5a UKP. Permo. Perma Ŝtata Universitato. 4 apr 1987.

Scienca gvidanto: Nikolaj Ponomarjov

1. Nikolai Lozgaĉev. Kaleburo kaj ĝia uzado en la Esperanta parolado kaj literaturo.
2. Larisa Kuzjmenko. Kunmetitaj vortoj en Esperanto.
3. Aleksander Korĵenkov. Kelkaj sintaksaj specifaĵoj de la ruslingvaj esperantistoj.
4. Halina Gorecka. Pri unu terminologia problemo: Tipoj de esperantistaj kunvenoj.
5. Rita Dautova. Pri la esperantaj tradukoj de la poemo “Velo” de M. Ju. Lermontov.

6a UKP. Permo. Perma Ŝtata Universitato. 2 apr 1988.

Scienca gvidanto: Nikolaj Ponomarjov

1. Halina Gorecka. Interlingvistiko en 1987: Revuo.
2. Dilara Gadirova. Ju. Križanić: Konciza skizo pri liaj vivo kaj verkaro.
3. Aleksander Korĵenkov. Interlingvistikaj konceptoj de V. I. Vengerov.
4. Vladimir Polikarpov. Kiu kaj kial venas al Esperanto: Provo de sociologia analizo.
5. Viktor Kudrjavcev, Iliŝija Novikova. Kompara analizo de la Esperanto-rusaj vortaroj de E. A. Bokarjov kaj V. D. Puŝkin.
6. Igorj Fejgin. Formiĝo de la interlingvistika terminologio en la angla lingvo.
7. Larisa Kuzjmenko. Pri la sufiksoidoj en Esperanto.
8. L. Litvinov. Pri la neceso de urĝa ellaboro de la universala lingvo.

7a UKP. Permo. Perma Ŝtata Universitato. 14 apr 1990.

Scienca gvidanto: Nikolaj Ponomarjov

1. Aleksander Korĵenkov. Tradukado de rusaj realaĵoj al Esperanto.
2. Nikolaj Lozgaĉev. Problemoj de tradukado de poezio el la rusa al Esperanto.



Entombiga numero de *Esperantologio*

Paweł Fischer-Kotowski (1990-) estas Pollanda esperantisto kaj hom-rajta aktivulo, laŭprofesie bibliotekisto. En la Esperanto-movado aktiva ekde 2010, i.a., kiel komitatano de UEA kaj ĝenerala sekretario de TEJO, studis interlingvistikon en UAM, redaktis la Jarlibron de UEA por 2016 kaj 2018; vicredaktoro de *La Ondo de Esperanto* ekde 2018.

Esperantologio = Esperanto Studies: EES. Kajero 8 (2018). / Red. Christer Kiselman. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2018. – 70 p.

En aprilo 2018 aperis la 8a kajero de *Esperantologio / Esperanto Studies (EES)*, laŭ la memprezento “internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al esperanto”. Fine de la jaro estis publikigita ankaŭ ĝia reta versio, kiu – simile al la antaŭaj numeroj – estas senpage konsultebla ĉe <http://www.cb.uu.se/esperanto>. Temas pri la lasta eldono de ĉi tiu scienca revuo, kion eĉ pli emfazas ĝia enhavo: ĝi estas grandparte dediĉita al la mortintaj esperantologoj. La rememorojn akompanas tri recenzoj (ĉiuj el 2016) kaj ĉi-foje neniuj originala studo. Temas pri fermo.

Kelkajn monatojn antaŭ sia forpaso Paul Gubbins recenzis la verdan brikon, t. e. *Historio de la Esperanta literaturo* de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Li rekomendas ĝin al ĉiu eĉ duonserioza adepto de la Zamenhofa lingvo, tamen li prilumas ankaŭ la malavantaĝojn de la verko, specife en la kampo de la Esperanta teatro, kiun li intencis mem trakti en aparta libro. Sekvas germanlingva recenzo de Klaus Schubert pri la unuopa numero de la anglalingva revuo INDECS el 2015, plene dediĉita al la “fenomeno de Esperanto”. INDECS estas mallongigo de *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (Interdisciplina Priskribo de Kompleksaj Sistemoj). En la koncerna numero, redaktita de Humphrey Tonkin kaj Veronika Poór, aperis 12 kontribuajoj pri diversaj aspektoj de Esperanto. La recenzan parton kompletigas la plej longa, okpaĝa, teksto de Leif Nordenstorm pri la reeldono de *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins. Fakte, temas pri konciza resumo de la libro kun valoraj komentoj kaj klarigoj de la recenzanto.

La dua parto de la kajero estas iom pli ampleksa. Temas pri nekrologoj kaj rememoroj pri kvin gravaj esperantologoj, el kiuj la unuaj du membris en la redakta



komitato de EES. Tri tekstoj estas dediĉitaj al Michel Duc Goninaz, mortinta la 26an de marto 2016. Lian plurkampan agadon prezentis la duopo Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor, emfazante ke li okupiĝis ne nur pri PIV, kiu donis al li plej grandan famon en Esperantujo. Pri tiu ĉi lia laborkampo rakontas en la sekva artikolo lia kunlaboranto Claude Roux. Mallonge rememoras lin ankaŭ Jacques Le Puil, redaktoro de *La KancerKliniko*, kun kiu Duc Goninaz estis ligita ekde la 4a numero per sia rubriko “El la taglibro de nekuracebla optimisto”. Pliaj tri tekstoj estas dediĉitaj al Detlev Blanke, unu el la plej gravaj interlingvistoj, kiu subite forpasis la 20an de aŭgusto 2016. Lian vivresumon verkis Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch. Personajn rememorojn pri Det-

lev Blanke prezentis en la angla Michael D. Gordin, usona historiisto de scienco. Omaĝis lin ankaŭ Haitao Liu, kiu nomas Blanke sia “interlingvistika patro”. En la kajero aperas tri pliaj nekrologaj tekstoj. Probal Dasgupta mallonge rememoras pri Paul Gubbins (mortis la 6an de aŭgusto 2016) – paralele en Esperanto kaj la angla, Carlo Minnaja rakontas pri la vivo kaj agadoj de la redaktoro, tradukisto kaj eldonisto Reinhard Haupenthal (mortis la 29an de septembro 2016), kaj Jukka Pietiläinen honoras Zbigniew Galor (mortinta la 27an de januaro 2017), kun kiu li kunaŭtoris libroforman studon pri la sinteno de esperantistoj al UEA.

Dum 19 jaroj aperis ok kajeroj de la revuo, kun sume 793 paĝoj. La origina intenco estis aperigi novan kajeron ĉiujare, sed en la praktiko ili aperis neregule – nova eldono venis de du ĝis kvar jaroj post la antaŭa. Dum sia ekzisto EES publikigis entute 35 originalajn studojn kaj 21 aliajn tekstojn: recenzoj, notoj, nekrologoj. Plejparto estis en Esperanto, sed aperis ankaŭ kontribuaĵoj en la angla (11), germana (4) kaj franca (1). La revuon ekde la komenco redaktis Christer Kiselman, kiu tiel celis daŭrigi la tradicion de la iama *Esperantologio* de Paul Neergaard (1949-1961). Por komparo, la antaŭa *Esperantologio* aperis en ses numeroj dum 12 jaroj, sur 424 paĝoj.

En *Salutvorto de la redaktoro* Kiselman konstatas: “Inter la revuo de Paul kaj la komenco de la nuna aperis paŭzo de tridek ok jaroj. Eble nun estos nova paŭzo de tridek ok jaroj, t.e. ĝis la jaro 2018+38 = 2056 ...” Mi esperas, ke iuj kompetentaj kuraĝuloj troviĝos pli frue.

Bitversioj de ĉiuj aperintaj numeroj de EES estas senpage elŝuteblaj en la retejo de Kiselman: <http://www.cb.uu.se/esperanto/>

La jarabono por 2019 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Studado en amika rondo

Ilia Gnusarev (1989-) estas instruisto pri historio en la urbo Penza (Ruslando); en 2016-17 li staĝis ĉe E@I en Partizánske (Slovakio), ekde septembro 2017 studas en la Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

Ekde la 2a ĝis la 9a de februaro en Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) pasis la kvara sesio de la Interlingvistikaj Studoj. En la nuna grupo studas dek homoj el ok landoj (Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Koreio, Rusio, Usono). Dum unu semajno ni havis tri ekzamenojn: pri interlingvistiko, pri Esperanta gramatiko (la dua semestro) kaj pri ĝeneralaj semantiko kaj leksikologio.

Samtempe nia grupo komencis studi la trian parton de la kurso pri Esperanta gramatiko, aplikatan lingvistikon, pragmalingvistikon kaj historion de Esperanto. Mi trovis la sesion tre utila kaj ĝuinda.

Kiel mi aliĝis al la Studoj? Min tre interesas Esperanto, ĝiaj literaturo kaj kulturo. En 2016 mi iĝis por unu jaro volontulo ĉe E@I (Partizánske, Slovakio). Danke al tio mi profundigis miajn sciojn pri Esperanto kaj, kiam mi eksciis, ke ekzistas eblo studi pri la Lingvo Internacia universitat-nivele en Poznano, mi decidis aliĝi al la studado, kiun gvidas Ilona Koutny. La Interlingvistikaj Studoj funkcias dum pli ol 20 jaroj, kaj multaj esperantistoj diversflanke spertiĝis studante en Poznano. Por mi kaj mia grupo pasis jam kvar sesioj, kaj mi povas diri, ke dum tiu tempo ni multon eksciis ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri lingvistiko, kulturo, literaturo, komunikado.


Dum la unua sesio ni studis fonologion kaj fonetikon. Mi ĉiam pensis, ke fonetiko estas enua teoriaĵo pri sonoj kaj intonacio.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



La 18an de marto familianoj, amikoj, kolegoj kaj samideanoj de Petras Čeliasukas gratulos lin okaze de lia 90a naskiĝdatreveno. Ankaŭ ni plezure aliĝas al la gratulado de la eminenta litova esperantisto, kiu pasint-decembre prezentis sian litovan-Esperantan vortaregon. (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Jubileoj kaj memordatoj en marto 2019

5. Antaŭ 165 jaroj naskiĝis **Rudolfs Libeks** (1854-1888-1908), latva instruisto k pio-nira e-isto, aŭtoro de la unua lernolibro de Eo por latvoj (1888).

6. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Gaston Moch** (1859-1889-1935), franca judo, armeano, pacifisto, e-isto k idisto; fondinto de Pariza E-grupo (1900), fonda membro de la Lingva Komitato (1905-12) k de la Akademio de Eo (AdE, 1908-12), la unua Ĝenerala Sekretario de la Kongresoj (ĝis 1909), fondinto k unua prezidanto de Internacia Societo E-ista por la Paco (1905), redaktoro de *Espero Pacifista* (1905-08), aŭtoro k tradukinto de kelkaj E-libr(et)oj.

11. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **John Wells** (1939-1955-), angla lingvisto k e-isto; prezidanto de EAB (2003-12); estrarano (1971-74; 1989-95) k prezidanto (1989-95) de UEA, prezidanto de LKK de du UKoj (1971, 1989), prezidanto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (1996-99), membro (1971-) k prezidanto de AdE (2007-13); aŭtoro de *Concise Eo and English Dictionary* (1969, 18 eld.), *Lingvistikaj aspektoj de Eo* (1978), *Geiriadur E-Kimra vortaro* (1985), *English-Eo-English Dictionary* (2010), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1997), honora prezidanto de EAB (2013). — Legu pli en NDK, p. 297-299.

14. Antaŭ 40 jaroj fondiĝis **Asocio de Sovetiaj Esperantistoj** (1979).

18. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Petras Čeliaskas** (1929-1957-), litovia k sovetunia instruisto, historiisto k e-isto; membro de LKK de la 90a UK (Vilno, 2005) k redaktoro de la kongresa kuriero *Vilna Sonoro*, aŭtoro de *Nuo Babelio iki Esperanto* (1989), *Litovio dum jarcentoj* (2002), *Bibliografio de Litoviaj E-eldonaĵoj* (2008), *El mia Esperanta skatolo* (2009), *Granda litova-Ea vortaro* (2019), redaktoro de *Litova Stelo* (1995-2005), tradukinto de pluraj libroj, honora membro de UEA (1999). — Legu pli en NDK, p. 65-66.

23. Antaŭ 5 jaroj mortis **Geraldo Mattos** (1931-1947-2014), brazila lingvisto k e-isto; membro (1970-2013) k prezidanto (1998-2007) de AdE, membro de la internacia komisiono pri la E-isto de la Jaro (1998-2012), aŭtoro k tradukinto de pli ol 20 libroj en/pri Eo, i.a: *Ivan VI* (1953), *La nigra Spartako* (1955), *La deveno de Esperanto* (1987), *Gramática completa do Esperanto* (1987), *Apartaj mondoj: Verboj k participoj* (1999), UEA: *Utila ekzercaro akademia* (2001). — Legu pli en NDK, p. 195-196.

30. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Juan Régulo Pérez** (1914-1932-1993), hispana instruisto k e-isto, membro de AdE (1953-93), konsiderata kiel la plej grava E-eldonisto, kiu dum 1952-76 kadre de la serio *Stafeto* aperigis 94 librojn kun sume 19.302 paĝoj; inter ĉi tiuj libroj estis *Kvaropo* de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti (1952); *Kontralte* de M. Boulton (1955); *La infana raso* de W. Auld (1956); *Esperanta antologio* (1958); *Lingvo kaj vivo* de G. Waringhien (1959); *Ŝtupoj sen nomo* de B. Ragnarsson (1959); *Kiel akvo de l' rivero* de R. Schwartz (1963); *33 rakontoj* (1964); *Proverbaro Esperanta* de L. Zamenhof (1974) k. m. a. — Legu pli en NDK, p. 239-241, <http://sezonoj.ru/2018/01/regulo/>

Aleksander Korĵenkov

Eventoj



Post Pollando, ankaŭ Kroatio donis al Esperanto la oficialan statuson de nemateria kultura heredaĵo. Por ricevi similan statuson nun oni klopodas en Slovakio kaj Litovio.

Esperanto – nemateria kultura heredaĵo en Kroatio

(Ret-Info) Kroata Esperanto-Ligo ricevis la decidon de ministerio pri kulturo, kiu konfirmas ke Esperanto estas deklarita nemateria kultura heredaĵo en Respubliko Kroatio, konforme al la Leĝo pri protekto kaj gardado de kulturaj valoroj.

La kultura valoro Esperanto eniros la registron de kulturaj valoroj de Respubliko Kroatio sub la numero Z-7298. Supozeble ĉi tiun oficialan decidon oni povas konsideri la plej granda atingon en la 110-jara historio de Esperanto en Kroatio.

Post Pollando ankaŭ en Kroatio Esperanto havas la statuson de protektata nemateria kultura heredaĵo. Ni esperas ke la Kroatia dokumento helpas al aliaj landoj efektiviĝi la kulturen protekton de Esperanto. La procezo de enirigo de Esperanto en la nacian registron de kulturaj nemateriaj heredaĵoj daŭris kvar jarojn.

Spomenka Štimec
prezidanto de KEL

Vilno: Esperanto en librofoiro

La 20a Internacia Vilna Librofoiro, okazinta la 21-24an de februaro en la ĉefurbo de Litovio, konis ankaŭ la internacian lingvon Esperanto!

Ĉe la stando de la Esplora Instituto pri Litova Kulturo amike kunlaboris Margarita Dautartienė, Egidijus Miltakis kaj Gediminas Degėsys. Ili vendis, kvankam ne multajn, Esperantlingvajn librojn kaj respondis demandojn pri Esperanto kaj ties movado en Litovio kaj tutmonde.

Ĉi-jara librofoiro, kiun partoprenis 68 mil vizitantoj, estis grava evento por litovaj memkonscio kaj literaturo; multaj famaj personoj, elstaraj sciencistoj kaj talenthavaj verkistoj kunestis, oni diskutis, planis kaj eĉ verkis dum la kvartaga ekspozicia periodo. Ni renkontiĝos ankaŭ venontjare, espereble kun novaj eldonaĵoj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj pri Esperanto.

Gediminas Degėsys

(Foto de la aŭtoro)





Przemysław Wierzbowski kun la ĵus ricevita premio (Foto: Stanisław Dobrowolski)

Jakobo Ŝapiro – unu el dek bjalistokanoj de la jarcento

La 19an de februaro 2019 pasis 100 jaroj depost kiam Bjalistoko ek troviĝis en la liberigita Pollando. Tiutage la urbaj aŭtoritatoj okazigis aron da eventoj, inter kiuj estis vespera festo en Podlaĥia Operejo. Dum ĝi oni prezentis 100 plej gravajn aktivojn de nia urbo el la jaroj 1919-2019. El la centoj estis elektitaj dek homoj, kiujn speciala ĵurio trovis la plej influaj kontribuantoj je disvolvado de la urbo.

La unua premiito estis esperantisto Jakobo Ŝapiro (1897–1941), sekretario de Bjalistoko, verkisto, ĵurnalisto, aŭtoro de la unua gvidlibro tra Bjalistoko, fervora prezidanto de Zamenhofa Esperanto-Societo, mortpafita de nazioj. Li jam estis memorigita per tabulo sur sia loĝdomo en la centro de Bjalistoko kaj ekde 2007 per strato. La premion de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski nome de Bjalistoka Esperanto-Societo akceptis ĝia prezidanto Przemysław Wierzbowski.

Przemysław Wierzbowski

Mesaĝo de UEA al UN kaj Unesko okaze de Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

La 21an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo, plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bangla, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo “pli granda”, parolata de la fortuloj de la momento.

Temas pri tio, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ekzemple rilate al la indiĝenaj lingvoj, sed ankaŭ rilate al aliaj “malfortaj” aŭ minoritataj lingvoj, kiuj rezulte ne aŭdiĝas en lernejoj, ne aperas en oficialaj rondoj, ne estas partoj de la publika vivo, kaj perdas sian rekonon kaj prestiĝon.

Tiel okazas iom post iom la malapero, morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian intelektan riĉecon – kiel pri tio rimarkigis multaj lingvistoj, kaj en 2019 aparte atentigas UN kaj Unesko.

Krom la socia maljusteco kaj psikologiaj problemoj rezultantaj el la perdo de uzeblo de sia gepatra lingvo, kaj pro nesufiĉa sperto en la uzo de la altrudata lingvo, necesas konscii ankaŭ pri aliaj realaĵoj: la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj necesaj ekzemple por daŭripova biodiverseco kaj por kultura kontinueco.

En la jaro 1999 Unesko proklamis la 21an de februaro la ĉiujara Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. Ĝia unua kaj ĉefa celo estis ree emfazi la edukajn avantaĝojn de uzo de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe en elementaj lernejoj. Infanoj pli rapide lernas legi kaj skribi en lingvo kiun ili plene komprenas – aŭ, pli precize, ili suferas malavantaĝon se ili estas devigataj komenci sian lernadon per lingvo kiun ili parte, aŭ eĉ tute, ne komprenas.

En sia mesaĝo al la 103a Universala Kongreso de Esperanto en 2018 Audrey Azoulay, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, deklaris: “Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj”.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsu, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Ĝi estas demonstra versio de la 95-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

LA PLEJ BONA OKAZO POR LERNI KAJ PRAKTIKI ESPERANTON



Nitra (Slovakio), 12-a ĝis 20-a de julio 2019



- Lernu kaj praktiku Esperanton
- Ekkonu homojn el diversaj landoj
- Amuziĝu dum bunta taga kaj vespera programo
- Malkovru Slovakion
- Ĝuu la etoson de Esperantujo

ses.ikso.net